


La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 6/7/1987 ★ Kr 8,50

Al la dua jarcento...



legu la artikolon pri esperanto kiel
pontolingvo en la maŝintradukado

Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,
Telefon: 08-11 74 34.

Esperanto Centro är öppet måndag-torsdag 08.00-16.00 och 17.30-19.00, fredag 08.00-15.00 lördag sept-maj kl 10.00-12.00.

Postgiro: 20 12-3, Esperanto-förbundet.

Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 100 kr
Familjemedlem (utan tidn.) 50 kr
Ungdomsmedlem 50 kr
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning Kvintinto. Om du inte får den, meddela födelseår till Esperanto Centro.

Esperantoförlaget

Postadress:

Box 7502, 200 42 Malmö.

Besöksadress:

Möllevångsgatan 20 B.

Öppettider: 1 sept.-15 maj:

onsdagar 10-11, torsdagar 17-18.

Skriftliga beställningar expedieras hela året, även under sommaren.

Telefon: 040-12 20 29.

Postgiro: 578-5.

Expedition: Wivi Nilsson.

Styrelsens ordförande:

Anita Lindblom.

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm tel
08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Karin Lindquist

Västermov. 19, 732 00 Arboga
tel 0589-155 31

Utformning: Bertil Danielsson,
Prästgårdsv 8, 672 00 Årjäng
tel 0573-105 69

Fotosats och tryck:

EsperantoCentro, Stockholm 1987



SEF:s styrelse

Ordförande: Karin Lindquist (La Espero massmedia)

Västermov. 19, 732 00 Arboga,
tel 0589-155 31.

Sekreterare: Ulla Luin,

Myggdalsvägen 123,
135 42 Tyresö
tel 08-712 82 91

Kassör: Börje Andersson (massmedia)

Ingeg. 4 A, 541 50 Skövde
tel 0500-122 05

Vice ordförande: Märtha

Andréasson, (SEF-årskongresser)
Pl 2265, 425 00 Hisings Kärra
tel 031-57 11 33

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin

(turnéer, bibliotek)

Ringv. 11 B, 579 00 Högsby
tel 0491-204 61

Styrelseledamot: Åke Rohdin (utredningar)

Engelbrektsg. 25 A, 702 13 Örebro,
tel 019-18 53 60

Styrelseledamot: Haldö Vedin (utveckling)

Jordbrogatan 57
603 64 Norrköping
tel 011-16 26 87

Suppleant: Ingemar Nordin (kansliet).

Mosebacke torg 8, 116 46 Stockholm,
tel 08-41 46 37

Suppleant: Bertil Andreasson
(utbildning, nordiskt samarbete)
Södra Rörum, 242 00 Hörby
tel 0415-501 52

Informationskommittén: Bernt

Lindquist

Västermov. 19, 732 00 Arboga tel
0589-155 31

Novajoj el Unuigintaj Nacioj



Batalo kontraŭ Lokustoj

Svarmoj de lokustoj, multigante pro abunda pluvo post jaroj de sekeco, grave minacas dekkvinon da landoj en centra kaj suda Afriko. La Organizaĵo de UN pri Nutrado kaj Agrikulturo starigis Krizan Centron por Kontraŭlokusta Agado en 1986 por kontroli, kunordigi kaj realigi limigan agadon. Rezulte, 90 procentoj de la rikoltaĵoj minacataj de la Senegala lokusto en la Sahela regiono de Afriko estis konservitaj. La suda regiono de Afriko estas ankoraŭ sub danĝero pro plago de verdaj lokustoj.

Agrikultura Fonduso

La Internacia Fonduso por Agrikultura Disvolvo (IFAD), kiun UN kreis antaŭ ok jaroj, aŭspicias projektojn por subteni malgrandajn farmbienojn kaj sengrundajn malriĉulojn en landoj kun malgranda enspezo. La 137 projektoj de IFAD helpas entute 10,5 milionojn da familioj. Kiam plene realigitaj, tiuj projektoj produktos nutraĵojn egalan al 20 procentoj de la cerealaj importoj de ĉiuj evoluantaj landoj,

kaj ili kreos pli ol 400 milionojn da tagoj da laboro jare, precipe en Azio, kie la bezono krei pli multajn eblecojn por dungigo inter la sengrunduloj estas tre granda.

Populacio

En 1987 la monda enloĝantaro atingos kvin miliardojn, laŭ la Fonduso de UN pri Populacia Agado (FUNPA). FUNPA helpas evoluantajn landojn nombri siajn enloĝantojn, starigi politikon pri loĝantaro kaj plenumi tiun politikon. Tiu laboro kontribuas al falo de homa fekundo en partoj de Azio kaj Latinameriko. La monda enloĝantaro atingis unu miliardon en 1830, du miliardojn en 1930, tri miliardojn en 1960, kaj kvar miliardojn en 1975.

Morbilo laŭ Usona vidpunkto

Se oni eliminus morbilon en evoluantaj landoj, Usono povus tuj ŝpari la 50 milionojn da dolaroj, kiujn ĝi nun elspezas jare je sia imuniga programo, kaj 2 700 usonaj infanoj evitus infektiĝon. La Fonduso de UN por Infanoj celas atingi tiun rezulton ĝis la jaro 1990.

Prezidanto:

De la jubilea jaro restas nur kelkaj monatoj. Estas tro frue fari konkludon de la rezulto. En Svedio kaj alilande la gazetaro kaj radio estis tre favoraj al la jubileo. SEF mendis eltranĉaĵojn de ĉiuj svedaj taggazetoj pri esperanto kaj ili estas mirinde multaj. Vi povas legi pri la disdivido en la lando aliloke en la gazeto.

Estrarkunsido

Ni havis estrarkunsidon la 5-an de sept. kaj la ĉefa punkto estis nia ekonomio, kiu vere ne estas brila, malgraŭ multaj malavaraj donacoj. Ni diskutis kiamaniere trovi novajn vojojn por plibonigi niajn financojn. Ĉu ŝanĝi Klubo Cent al Klubo Mil? Ĉu libervola pago krom la membrotizo? Ĉu vi, kara leganto, havas opinion en tiu demando, bonvolu sciigi nin (nia venonta kunsido okazos la 28-29 de novembro).

Ni elspezis multe por informmaterialo sed vendis malmulte. Ĉu vi havas ideon kiun fari por malpliigi la stokon de tiu materialo???

La Espero

SEF aĉetis Mc Intoch komputilon kaj ek de venonta numero ni kompostos la tekston de La Espero pere de tiu. Per Aarne Fritzson kaj Roy Auer kune prizorgos tiun laboron. Franko Luin pere de la zurskribilo finformos la gazeton. Bertil Danielsson restos en la gaze-

Bibliotekstjanst anoncis en sia listo al, inter alie, ĉiuj bibliotekoj pri "100 år med Esperanto". Tiu espereble signifas ke multaj bibliotekoj aĉetos! Estas malkara (7 kr por unu, 50 kr por 10 ekz) donaco al viaj neesperantistaj geamikoj. Donu ĝin anstataŭ floroj al la "gastigantino". Memklare vi mem devas posedi ĝin!

Tiu libro oni povas uzi ankaŭ venontan jaron sed la jubilea afiŝo estas uzebla nur tiun ĉi jaron (4 kr por unu kaj 35 kr por 10). **Mendu la prezaron de la materialo ĉe Esperanto Centro.**

Libroj

Kaj de Erik Carlén kaj de Stellan Engholm ni ricevis librojn, kelkaj tre valoraj. Ni unue kontrolos por la SEF-a biblioteko; sed la ceterajn ni aŭkcios ek de tiu numero de la gazeto. Bona okazo por vi recevi valorajn librojn kaj samtempe plibonigi la SEF-an kason! Proponu altan prezon!

ta komitato por helpi la redakton.

La venonta numero de la gazeto aperos ĉirkaŭ la 1-a de decembro. Manuskriptojn mi akceptos ĝis la 20-a de oktobro.

la redaktoro



Edukado

La edukada komitato (Bertil Andreasson kaj Märtha Andréasson) estas preta helpi regionojn kaj klubojn aranĝi kursojn en diversaj kampoj – pri informado, argumentado, interpretado, administrado ktp.

Turneoj

Dum aŭtuno okazos du turneoj. Stefan Mc Gill turneos 28/9-11/10 en 8 lokoj pri lingva komunikado inter okcidento kaj oriento. Pri Brazilio rakontos Marco Dutra en 17 lokoj 14/10-5/11.

Venonta kunsido

Dum nia novembra kunsido ni preparos labor- kaj ekonomiplanojn por 1988/1989. Danke ni akceptas ĉiujn ideojn kaj proponojn de vi.

La kunlaboro inter SEF kaj la kluboj kaj unuopaj esperantistoj estas grava por nia progreso kaj estonta venko.

Karin Lindquist

Esperanto som mellanpresentation i datoriserade översättningar

Sedan flera år försöker man på många håll i världen att lösa problemet med automatiserad översättning. Ett av de största projekten pågår sedan 1979 vid det holländska dataföretaget BSO och använder esperanto som ett viktigt hjälpmedel. F n sysselsätter projektet ett 15-tal personer och finansieras till hälften av den nederländska staten. Även EG visar stort intresse för detta språkprojekt, eftersom det till skillnad från de flesta andra avser översättning mellan fler än två språk

– något som naturligtvis är av fundamental betydelse för en organisation med inte mindre än 10 officiella språk.

BSO-projektet heter DLT (Distributed Language Translation) och arbetar enligt metoden med ett s k brospråk vid den datoriserade översättningen, d v s man översätter först till brospråket och sedan vidare till det aktuella språket. En förutsättning för att metoden skall fungera är att det valda brospråket är logiskt och anpassat för datorer. Att man

valde just esperanto som brospråk är därför knappast överraskande, men vad som är intressant är att man under årens lopp kunnat plocka bort de flesta av de modifieringar av esperanto som man inledningsvis införde för att göra språket så datoranpassat som möjligt. Det holländska projektet, som av oberoende internationell expertis betraktas som mycket lovande, innebär därför ett kraftigt ökat intresse för esperanto bland experter på datoriserad översättning.

Haldo Vedin

Många bidragsgivare till SEF kan sporra ännu fler att ge...

Jubileumsåret har givit esperantörörelsen i Sverige tämligen god publicitet. Samtidigt har det dock också betytt stora utgifter för SEF.

Det gäller dels kongressen i Stockholm, där den pampiga inramningen med riksdagshuset som "kongresejo" medförde stora kostnader, dels den nödvändiga upprustningen av maskinparken i Esperanto-Centro med bland annat inköp av en dator, dels den stora satsningen på tryckning av informationsmateriel.

I det sistnämnda fallet har SEF ställt färdigt materiel för över 40 000 kr. Klubbar och enskilda medlemmar har ännu inte utnyttjat denna rika flora av materiel i väntad utsträckning. Vid september månads början hade inköp gjorts för endast cirka 15 000 kr. SEF hoppas att många och stora beställningar nu görs, så att förbundet återfår de stora belopp, som materialet kostar. Det skulle betyda mycket för ekonomin.

Som framgått av redovisningar i La Espero har många medlemmar

i form av penninggåvor stöttat upp förbundet så att det kunnat fortsätta verksamheten i Esperanto-Centro, som ligger så centralt i Stockholm men därför har så hög hyra (över 44 000 kr om året), samt trygga utgivningen av La Espero trots att det statliga pressstödet förlorats på grund av de nya bidragsbestämmelserna. Några medlemmar och klubbar har skänkt mycket stora belopp.

Så länge årsavgiften hålls på en blygsam nivå, måste förbundets ekonomi i stort sett grundas på gåvor. SEF:s styrelse vill därför vädja till alla, som har möjlighet att bidraga, att sätta in ett belopp, stort eller litet, på förbundets postgirokonto 2012-3. Kanske kan det ske som en julgåva, kanske i samband med någon högtidsdag eller annan händelse.

Ett 50-tal av förbundets cirka 1 400 medlemmar har i år hittills skänkt en extra hundralapp som "medlemsavgift" till Klubbo Cent. Kan vi hoppas på fler medlemmar där?

Styrelsen

Esperanto- främjare!

Fortfarande pågår Esperantos jubileumsår och det råder en febril aktivitet landet runt för att markera detta. Klubbarna ordnar skärmutställningar i bibliotek och i bankfönster och vid marknader och andra planerade folksamlingar ser man också bokbord med esperantolitteratur. Det markant ökade esperantointresset i landet fångas upp antingen i studiecirklar som ofta leder över till fullt medlemskap i SEF eller av Esperantofrämjandet.

Eller hur?

Det scenario jag här målat upp kanske inte helt överensstämmer med verkligheten, men nog vore det en bild. Nu gäller det Esperantofrämjandet.

Antalet främjare har ännu inte passerat 300 personer. Det första etappmålet var att varje SEF-medlem skulle värva en esperantofrämjare, vilket skulle betyda 1 500 EF-are. Dit är det långt. Kan vi inte enas om en kraftanstängning för att nå detta mål medan jubileumsåret varar.

Esperantofrämjandet är vår or-

ganisation för dem som vill stödja oss åtminstone med sitt namn och dessutom vill hålla sig informerade om esperantosaken. För årsavgiften kr 20 blir man registrerad som esperantofrämjare och får två informationsutskick under året. Vi kan på goda grunder anta att åtskilliga tusen svenskar är beredda att stödja Esperanto på detta sätt, men det är vi, aktiva medlemmar, som måste söka upp dem. Det är självfallet önskvärt att så många som möjligt blir fullbetalande medlemmar i SEF, men vi måste förstå, att alla inte är beredda att ta steget, men även dom vill vi räkna in bland dem som stöder Esperanto.

Birger Viggen

Donacoj

Koran dankon pro la bonvenaj donacoj:

Borlänge Esperantoklubb
al memoro de Astrid Rääf 100:—
Märtha Andreasson, Hisings
Kärna 200:—

DANKON



Esperanto-renkontiĝo en Leipzig

En Leipzig en DDR okazos 11-13 de marto 1988 "Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo". Ĝi havos eblecon gastigi 250 esperantistojn kaj petas de fakuloj proponojn pri prelegoj ktp rilate al la ĉeftemo "Homo kaj scienc-teknika revolucio". Eblas jam nun mendi ampleksan bultenon ĉe Kulturbund der DDR, Organiza Komitato de "IFER 88", Käthe-Kollwitz-Strasse 115, DDR-7010 Leipzig.

Limdato por aliĝo estos la 31:a de decembro 1987.

KVALITETSAUKTION

Arvingar till Stellan Engholm och Erik Carlén har donerat till SEF dessas efterlämnade esperantoböcker. Det har berikat vårt bibliotek i hög grad men också gett oss ett antal mycket värdefulla dubbletter, som vi kan erbjuda våra medlemmar och samtidigt förstärka SEF:s magra kassa.

Observera, att nedan erbjudna böcker alla är inbundna och i skick som nya. Det enda som tyder på att någon annan ägt dem, kan vara ett exlibris, en dedikation eller annan anteckning. Så t ex finns i Nr 1 skrivet "Till Olga 24/3 34 från Stellan", men inte sänker det värdet! Snarare tvärs om. Var det hennes födelsedag eller var det det första exemplaret av hans översättning?

Och PIV, den kostar i dag c:a 470 kr. Här är en fin chans att få en åtråvärd bok med skaplig rabatt.

La Faraono i tre vackra band. Läs på nytt om översättaren Kabe i La Espero nr 3/1987, sid. 45:

"Lia lingvaĵo estas pura, klara, simpla, vere eleganta,...liaj frazoj estas perfekte ekvilibrataj,...li skribas vere int. E-n, lingvon agrable glatan, lude legeblan".

Nr 15 har skänkts oss av annan person. En klenod det också, en hälsning till Sven Jerring, en an-

nan av våra berömdheter, från SEF-kongressen i Linköping 1961. Skulle det inte vara spännande att läsa baksidan? Men det kostar minst 100 kronor, och det krävs höga bud på de andra numren också. Alla är de klenoder.

Sänd in ditt anbud till Esperanto Centro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, senast två veckor efter att du fått tidningen. Skriv "auktion" utanpå kuvertet.

Auktionslista

1. Lagerlöf, Gösta Berling (1934)
2. La taglibro de Anne Frank (1959)
3. Jelušič, Cezaro (1934)
4. Angla Antologio (1957)
5. Sveda Antologio I o II, (1934)
6. Maefker, Jarmiloj pasas (1930/31)
7. Zamenhof, Originala Verkaro (1929)
8. Zamenhof, Fundamenta Krestomatio (17a eld. 1954)
9. Plena Ilustrita Vortaro (1977)
10. Ferber, Fanny
11. Prus, La Faraono I, II, III (1957)
12. Lapenna, Retoriko (Dua eld. 1958)
13. Rosetti, Kredu min sinjorino
14. Mickiewicz, Sinjoro Tadeo (1953)
15. Poŝtkarto, SEF 55-a kongreso 1961.



Postkarto



*Hen Jern Jerring
Stockholm
Radiotjänst*

Artist-tävlan i DDR 1988 för esperantister

I augusti 1988 anordnas i den östtyska staden Karl Marx-Stadt den 8:e träffen med pionjär-organisationen "Ernst Thälmann". Pionjärörelsen i öststaterna motsvarar som bekant vår scoutörelse.

Med anledning av träffen inbjuder ungdomssektionen av distriktets esperanto-förbund alla esperanto-konstnärer (professionella eller amatörer) till en internationell artisttävlan.

Man kan sända verk av olika slag till tävlingen: Målningar, grafik, skulpturer, fotografier, eller annat. Ämnet för tävlingen är för deltagare över 14 år: "Slå vakt om freden för barnens skull". För eventuellt deltagande barn under 14 år är ämnet "Vi barn älskar en fredlig värld".

Bidrag till tävlingen skall sändas före den 15 april 1988 till Dipl. Phil. Christian Papenmeier, Obere Hauptstrasse 104, Oelsnitz, DDR- 9156. Ange fullständig adress och födelsedatum!

De insända bidragen visas i en utställning i samband med pionjär-träffen. Alla deltagare erhåller diplom. De bästa verken får pris i form av filatelistiska souvenirer, fotoalbum från Karl Marx-Stadt eller andra värdefulla saker.

Ĉu vi vidis nin

Ĉu vi estis unu el la multe pli ol 30 000 vizitantoj ĉe la foiro **Bok & Bibliotek '87**, kiu okazis fine de aŭgusto, eble jes? Ni ne kalkulis la homojn al kiuj ni havis eblecon informi pri esperanto, sed plej ofte estis aro (malgranda, jes) kiu demandis, aŭskultis aŭ aktive partoprenis. Dum du tagoj tiuj estis bibliotekistoj, instruistoj aŭ ĵurnalistoj, dum du tagoj la ĝenerala publiko.

Esperanto

Radiostacioj, kiuj disaŭdigas programojn por internacia publiko, tutmonde indikas sendotempojn laŭ Universala Tempo Koordinita UTC (pli frue nomita GMT).

La frekvencojn oni indikas je kilohercoj (kHz); krome estas ankoraŭ kutimo parenteze noti ondolongojn je metroj.

Al ĉiuj ĉi-subaj horindikoj ni devas aldoni **unu (1) horon** en Meza Eŭropo (Svedio); en periodo de t.n. **somera tempo** (ekz. 1987 03 29-09 27) **du (2) horojn**.

Aŭskultu regule - laŭeble ĉiun tagon - por tiel ekzerci vian kapablon facile sekvi parolatan lingvon! Skribe raportu al la Esperanto-redakcioj de la koncernaj stacioj, petu iliajn programajn informilojn, proponu mem programerojn ktp.

Ĉiutage:

0530-0600 Varsovio: 1503 (200, 5995 (50,0), 6135 (48,9) 7270 (41,3)

1100-1130 Pekino: 6955 (43,1) 9480 (31,6) al regiono: Japanio, Koreio

1100-1125 Varsovio: 7145 (42,0), 9525 (31,5)

1300-1330 Pekino: 11650 (25,7), 15385 (19,4) al regiono: Sudorienta Azio

1530-1555 Varsovio: 6095 (49,2), 7285 (41,2)

1630-1655 Varsovio: 6095 (49,2) 7285 (41,2)

1930-2000 Varsovio: 6095 (49,2) 7285 (41,2)

2000-2030 Pekino: 7470 (40,1), 9365 (32,0) 9965 (30,1)

2130-2155 Varsovio: 1503 (200) 6095 (49,2) 7285 (41,2)

2230-2300 Pekino: 9630 (31,1) 11515 (26,1) al regiono: Latin-Ameriko

Lunde:

1630-1645 Berno: 3985 (75,3) 6165 (48,7), vidu noton 1)

Merkrede:

0115-0130 Berno: 5965 (50,3) 6135 (48,9), **9725**(30,8), 9885 (30,3) 12035 (24,9)

0315-0330 Berno: 6135 (48,9) **9725** (30,8) 9885 (30,3), 12035 (24,0)

0745-0800 Berno: **9560** (31,4), 9885 (30,3), 11905 (25,2), 15570 (19,3)

1045-1100 Berno: 11935 (25,1), 15570 (19,3), **15585**(19,3), 17830 (16,8)

1315-1330 Berno: 11905 (25,2) 11955 (25,1) **15570** (19,3), 15585 (19,3) 17830 (16,8)

1515-1530 Berno: 9885 (30,3), 11840 (25,3), **15430** (19,4), 17830 (16,8)

1715-1730 Berno: 9885 (30,3), 11955 (25,1), **15325** (19,6), 15430 (19,4) 17830 (16,8)

2215-2230 Berno: 5965 (50,3), **9625** (31,2), **9885** (30,3), 12035 (24,0)

Atentu! Ciferoj, ĉi-supre substrekitaj, indikas frekvencon de plej forta sendilo. 2215-2230 tra sendilo el Gabon = antena efikeco je 500 kW (**9625** kHz)

Alte taksita estis la vizito de **Ingemund Bengtsson**. Malgraŭ li ankoraŭ ne tute resaniĝis, li tamen venis saluti nin.

Ebbe Vilborg prelegis en "Speakers Corner" pri esperanta lite-

ratur kaj **Bernard Nzaniye** el Tanzanio havis 25 malgrandajn "kursojn" por pli ol 60 personoj.

Estas neeble mezuri la efikon de partopreno en tia aranĝo. Tamen, ni montris ion de la esperan-

en Radio

Ĵaŭde:

0500–0515 Vatikano: 1611 (186,2), 6250 (48,0) 7250 (41,4), 9755 (30,8), 11715 (25,6)

1630–1645 Berno: kiel lunde vidu noton 1)

Sabate:

Berno: kiel merkredoj – disaŭdigo 8-foje

1630–1645 Berno: kiel lunde vidu noton 1)

2000–2020 Romo: 7275 (41,2) 9710 (30,9), 11800 (25,4)

Dimanĉe:

0535–0550 Vieno: 5945 (50,5), 6000 (50,0), 6155 (48,7), 11830 (25,4)

0930–0945 Vieno: 6000 (50,0), 6155 (48,7), 7210 (41,6), 11830 (25,4)

1900–1910 Vatikano: 1530 (196,1) 6190, (48,5), 6250 (48,0) 7250 (41,4), 9625 (31,2) 9645 (31, 31,1), 11700 (25,6), 15120 (19,8) vidu noton 1)

Atentu: En festotagoj 1 majo, 14, 15, 16 aŭgusto, 1 novembro, 8, 24, 25, 26 decembro Vatikano emisias programojn kiel dimanĉe. 2145–2200 Zagrebo: 1143 (262,4) vidu noton 1)

Kelke da konsiloj

Vi certe atentis la vortojn "vidu noton 1)" kiujn ni deziras klarigi jene: Temas pri Tri esceptoj, kiuj validas dum la tuta jaro, vintre kaj somere. Kaŭze de tio la aŭskultanto devas alkalkuli du horojn al la indikita Universala Tempo por programoj el Berno 1630 lunde, ĵaŭde kaj sabate; el Vatikano 0500 ĵaŭde kaj 1900 dimanĉe; el Zagrebo 2145 dimanĉe.

Helpilo por pli facile retrovi deziratajn programojn

Se vi surgluas strion kun centimetroj kaj milimetroj al la skalfnestro de via ricevilo, vi poste povas noti la nomon, tagon, sendohoron kaj ev. frekvencon de la koncerna stacio en vian notlibron. Ekzemple: stacio a) 3, 2, 7, 4, 13, 9 ktp laŭ la nombro de frekvencoj uzeblaj en via loko, domo kaj eĉ ĉambro. Ne forgesu, ke en unu milimetro povas esti eĉ deko da diversaj stacioj/frekvencoj, kiuj interbatalas sur minimuma spaco. Pro tio vi povas atenti ankaŭ duonojn da milimetro: 3, 2-, 7, 4+. Tiuj minus-kaj plussignoj estas je bona helpo, kiam vi singarde reserĉas vian favoratan stacion. Ne forgesu, ke temas ofte pri dekono da milimetro. Movu kun trankvilo la manovrilon kaj indikilojn de via ricevilo.

Se vi estas feliĉa posedanto de moderna ricevilo kun diĝitala indikilo de frekvencaj nombroj, vi povas forgesi la supre donitan konsilon. Tamen, bonŝancon!

Ne timu skribi aŭ telfoni!

Se vi havas problemon, kiam vi volas trovi staciojn kun Esperantoprogramoj, vi povas skribi aŭ telefoni al I-L Pk. 55028, 415 17 Gotenburgo, tel 031-48 95 97. Volonte petu konsilojn antaŭ aĉeto de radio-ricevilo

Lennart Åberg

NE FORGESU AŬSKULTI KAJ SKRIBI AL "NIAJ" BRAVAJ RADIOSTACIOJ!!!

ta literaturo al interesitoj, vendis "Esperanto! Nyckel..." al multaj. Inter la vizitantoj estis multaj novaj kursanoj en Göteborg el Ĉinio, Pakistano, Irako kaj Irano.

Ĉetere anoj de la kluboj en Göteborg en bona etozo laboris dum kvin tagoj en la foirejo, gvidataj de Inga Johanson.

Anita Lindblom

Karaj Svedaj Veteranoj!

Dum la jubilea kongreso en Varsovio la veteranoj kompreneble kunvenis. Ni estis pli ol cent ĉeestantoj el 23 landoj. La prezidanto de la Pola Sekcio de Veterana Esperantista Klubo (VEK) s-ro Lech Kosieniak bonvensalutis. La sekretariino de VEK s-ino Julie Winter raportis pri la nuna stato de VEK, kiu havas 1712 membrojn el 43 landoj. Ŝi dum 15 jaroj havis sian postenon kaj deziris ekŝigi. La prezidanto de VEK Olle Olsson dankis al ŝi pro bonege farita laboro kaj anstataŭ floroj transdonis al ŝi libron eldonitan kontribue al la centjara jubileo: La Fratoj Leonkoro de Astrid Lindgren kaj tradukita de Kerstin Rohdin.

Post elekto de s-ino Bodil Kühlmann, Danlando, kiu fariĝis la nova sekretariino, rakontis s-ro Eugen Rytenberg pri siaj memoroj de d-ro Zamenhof. Sekvis salutoj de Ĉinio, Nov-Zelando, Norvegujo, Sovet-Unio, Japanujo kaj Ĉeĥoslovakio.

Post fotografado la sekretario de la Pola Sekcio de VEK s-ro Tadeusz Pleskaczyn'ski en aŭtobuso gvidis la ĉeestantojn tra Varsovio al interesaj lokoj, ekzemple la kvartalo, kie loĝis d-ro Zamenhof, al la impona monumento pri la mortigitaj Varsovianoj (farita el sveda ŝtono destinita al la gloro de la miljara regno) kaj fine al la bele ornamita tombo de d-ro Zamenhof.

Dum la jubilea jaro multaj svedoj anoncis sin kiel veteranoj (= esperantistoj dum kvardek jaroj) kaj sendis priskribon de sia esperantista vivo al la jena adreso: Olle Olsson, Södra Esplanaden 23, 223 52 Lund. Nun ni devas fondi svedan sektion de VEK. Bonvolu proponi nomojn por elekto de prezidanto, sekretario kaj kasisto!

TRA LA LANDO

Suda regiono

Tre amuza Dan-Sveda Esperanto tago

La 43-a Dan-Sveda Esperantotago okazis la 30-an de aŭgusto. Ĉijare la tago estis dediĉita al la kulturo. Post kolektiĝo en Helsingborg la 66 partoprenantoj aŭtobuse foriris al la mineja muzeo en Nyvång, kie ili povis studi

la historion pri la antaŭa ekspluato de karbo. Post lunĉo la grupo vizitis la plej malnovan maljunulejon en la lando, Gyllenbielkeska Hospitalet en Kvidinge, kiu nun estas interesa muzeo, kiu montras parton de malnova socia vivo. Lasta punkto de la programo estis la bela parko de Vrams Gunnarstorp kun heĝoj de bukso, kiuj estis grandaj jam en la tempo de Linné.

Suda Distrikto planas unutagan lingvan seminarion la 14-an de novembro en Malmö.

Gvidanto: Ebbe Vilborg

Pluaj informoj: Andreasson, tel 0415-501 52.

La 22-a Internacia Konferenco de ILEI

okazos en Stevensbeek, proksime al Nijmegen, Nederlando 16-23 julio 1988. Kadrotemo de la konferenco: Tradiciaj kaj modernaj instrukceptoj en la instruado de Esperanto.

La programo enhavos i.a.: Cseh-arangoj, prezento de la "Esplorkreiva vojo", prezento de la projekto "Spertoj de kursgvidantoj", tuttaga ekskurso.

Se vi deziras pluajn informojn bonvolu kontakti Bertil Andreasson 0415-501 52.

Tre dagars arbete i "komitato"

Komitato – Universala Esperanto Asocio's högsta beslutande myndighet består av 84 medlemmar och 5 observatörer. De senaste representerar förbund med mindre än 100 medlemmar. Man väljs in i Komitato i kategorierna A, B och C, som alla är likvärdiga. A väljs av landsförbunden i proportion till antalet medlemmar, B väljs av de individuella medlemmarna i UEA och C väljs av A och B för att få in medlemmar i Komitato med speciella erfarenheter. Sverige representeras av Karin Lindquist och undertecknad. STYRELSEN består av 9 personer med Humphrey Tonkin som ordförande. Man har valt tredje år. De övriga styrelsemedlemmarna kommer från Belgien, Frankrike, Japan, Ungern, Italien och Nederländerna.

Arbetet i styrelsen och i Komitato är indelat i olika sektorer med olika styrelseledamöter som ansvariga för arbetet. En sektor har hand om kontakterna med organisationer och organ utanför esperantorörelsen, t ex FN och Unesco, en sektor har hand om kontakterna med de olika medlemsförbunden och samordnar verksamheten bland medlemmarna

och den tredje sektorn sköter UEA:s finanser. Inom de olika sektorerna finns det sedan olika arbetsgrupper, vars medlemmar utsetts av styrelsen eller av Komitato. Det kan vara tillfälligt sammansatta grupper för olika projekt, men det kan också vara grupper som är avsedda att arbeta under hela året till nästa kongress. Victor Sadler, som har haft ansvaret för förbundets finanser, har på grund av sjukdom blivit tvungen att avsäga sig sitt styrelseuppdrag. I hans ställe invaldes Gian Carlo Fighiera, som en gång fungerade som ständigt kongressekretärer i förbundet.

Komitato hade i år valt att sammanträda i 3 dagar före kongressen för att i mera lugn och ro kunna hinna igenom dagordningen. Sammanträdena i Komitato omväxlade med arbetet i sektorerna. Där var det speciellt sammanträdet med de ansvariga för de olika landsförbunden, som var intressant. Det rörde information, undervisning, olika tjänster mm som kan vara av intresse att ta del av. Vad gäller undervisning bör vi samarbeta med lärarnas esperantoorganisation. Styrelsens verksamhetsberättelse debatterades

och godkändes vid ett allmänt möte under kongressveckan.

Märtha Andreasson

Fondita Akcia kompanio esperantista

Oy MENDOSERVO Ak estas tute nova poŝtvenda entrepreno en Finnlando. Ĝi vendas, ne nur esperantaĵojn, sed ĉiaspecajn varojn, kiujn librovendejoj kutimas vendadi, kaj ope kaj pogrande.

ANKORAŬ la stoko estas malgranda, sed la firmao volonte kompletigas ĝin per bonkvalitaj produktoj kun konkurencaj prezoj.

La nova firmao havas gravan avantaĝon laŭ vidpunkto de reklamado de Esperanto, ĉar ĝi direktigas ankaŭ al neesperantistaj medioj, kie certe oni rimarkos, ke aĉeteblas i.a. esperantaj lerniloj kpt.

Oy MENDOSERVO Ak ankoraŭ estas malgranda, sed energia kaj kreskema entrepreno. Ĝia administrejo havas adreson: Kivistöntie, SF-055 10 Hyvinkää. Tel. 914-800 54 kaj la distribuejo: Tiriläntie 7, SF-054 00 Jokela.

UEA informas....

Universala Esperanto-Asocio estas proponata por la premio Nobel kaj la premio Unesko.

Menciante la centjaran kontribuon de Esperanto al la paco, eminentuloj en multaj landoj proponis Universalan Esperanto-Asociation, kiu estis fondita en 1908, du-dekon da jaroj post la kreiĝo de Esperanto, por la Pacpremio Nobel de 1987. Laŭ la Voĉo de Ameriko, UEA ricevis la trian plej grandan nombron da proponoj. La Asocio estas ankaŭ kandidato por la Unesko-Premio por Edukado por Paco. UEA havas konsultajn rilatojn kun Unesko jam de post 1954 kaj Esperanto-dufoje ricevis subtenajn rezoluciojn ĉe la Ĝenerala Konferenco de Unesko, en 1954 kaj 1985.

Parlamenta Esperanto-grupo renkontiĝas en brita parlamentejo

Festa akcepto estis lastatempe aranĝita por la Parlamenta Esperanto-Grupo en la Ĉambro de Deputitoj, honore al la jubilea jaro de Esperanto. Ĝin prezidis parlamentano Roger Gale. Tiel granda nombro da homoj partoprenis, ke oni devis malfermi duan akceptejon. Post malferma parolado de s-ro Gale, parolis s-ino Mary Austin, prezidanto de la Esperanto-Asocio de Britujo, kiu priskribis lastatempajn evoluojn, inkluzive la akceptigon de Esperanto kiel oficiala temo de la Ĝenerala Diploma de Meza Edukado (GCSE).

La Parlamenta Esperanto-Grupo estas nun la plej granda grupo ĉe la Parlamento. Membras 204 parlamentanoj, inter ili Ministroj Robin Squire, Ken Weetich kaj Geraint Howells. Kvankam nur dekkvino da parlamentanoj iom scipovas Esperanton, multaj aliaj subtenas la bezonon de internacia lingvo, kiu, laŭ ili, helpus fortigi la ligojn inter la nacioj

Kongressresa till Rotterdam 1988.



NORD SYD RESOR, Enköping kommer att i samarbete med SEF att arrangera en gruppresa till kongressen i Rotterdam 1988. Det blir ett enkelt och bekvämt sätt att ta sig till och från kongressstaden, med logi och mat ordnat under kongressveckan. Inkvartering sker i dubbelrum med dusch o WC på utmärkta RIJNHOTEL, helt nära Kongresscentrum.

Här nedan programmet:

Avresa: fredag 22 juli 1988

Återkomst: måndag 1 augusti 1988

Påstigning: Stockholm – E18 – Örebro (=anslutning fr Norge) – Motala – Jönköping – E4 – Helsingborg

Färjor: Helsingborg-Helsingör och Rödby havn-Puttgarden

Buss: modern helturistbuss med toalett. Typ SETRA 215HD

Reseledare/Chaufför: Sven Jonsson/Lars Malmström

Resväg: Dag 1 Stockholm-Rödby, Danmark. Dag 2

Rödby-Rotterdam. Dag 3-9 kongress i Rotterdam. Dag 10

Rotterdam-Köpenhamn. Dag 11 Köpenhamn-Stockholm.

Hotell: natt 1: Hotell E4, Rödby, natt 2-9: Rijnhotell, Rotterdam, natt 10: Hotell Ansgar, Köpenhamn.

Samtliga hotell med dubbelrum med dusch/WC och inkl. frukost. Rijnhotel, Rotterdam ligger helt nära Kongresscentrum. Totalt 10 övernattningar med frukost. Resan omfattar 11 dagar.

Pris: 3 960:–/person i dubbelrum

Anmälan: sker direkt till NORD SYD RESOR – Enköpings Resebyrå, Box 336, 199 03 Enköping, Tel. 0171-356 63.

Arrangör: enligt lagen om Resegarantier är Nord Syd Resor, Enköping.

Många esperantister kommer att deltaga i kongressen. För att vara säker på plats i bussen – anmäl Er snarast. Välkommen!!

de la mondo.

Decembra konferenco pritraktos lingvon kaj kulturon

Vendredo, 11 decembro, estas elektita kiel la dato de la Kvina Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado, organizita komune de CED kaj de la Traduka Fakto de UN. La ĉi-jara temo estos "Lingvo kaj Kulturo en Internaciaj Organizaĵoj". Proponojn pri referaĵoj, kiuj traktu la lingvan aspekton de la multkultura medio de internaciaj organizaĵoj, oni sendu al d-ro Humphrey Tonkin, prezidanto, State University College, Potsdam, NY 136 76, Usono. Prezentantoj de referaĵoj devos ĉeesti la konferencon. Limdato: 31 aŭgusto 1987.

Referaĵo prezentita en Esperanto
Ĉeestantoj de la Konferenco pri Lingvo en Religio, 15-16 majo, ĉe Bergen Community College, Novjerzeo, Usono, estis agrable surprizitaj kiam Pastro George Korytkowski prezentis sian referaĵon "Esperanto por Religiaj Celoj" en la Internacia Lingvo. Angla traduko, distribuita al la partoprenantoj, ebligis neparolantojn de Esperanto sekvi la paroladon. **Atingi jurnalistojn dum la jubilea periodo**

La Novjorka Oficejo de UEA aparte rekomendas al la legantoj de la Esperanto-eldono de la Novjorka Novajletero, ke ili traduku

Astrid Lindgren en Esperanto - sveda kontribuo al la Jubilea jaro.

La Fratoj Leonkoro, unu el la plej travaj verkoj de Astrid Lindgren, aperis en esperantotraduko de Kerstin Rohdin. Kiel sveda kontribuo al la 100-jara jubileo de Esperanto oni ne povas imagi al si pli grandan verkon por traduki. La libroj de Astrid Lindgren jam estas konataj kaj amataj ĉie en la mondo kaj en ŝia granda verkaro La Fratoj Leonkoro meritas apartan atenton. Ĝi estas libro por kaj infanoj kaj plenkreskuloj traktanta la eternajn universalajn problemojn de la homaro.

Pri la enhavo jam troviĝas amaso da analizaj artikoloj de veraj pro-

fesiuloj. Tial mi ne povas aldoni ion tiurilate. Mi nur konstatas ke nur kiam ĝi aperis en Esperanto mi legis la verkon, kvankam miaj infanoj jam antaŭ jaroj urĝis min fari tion. Mi nun tute komprenas kial kaj mem volas instigi aliajn al legado.

La lingvo estas tipa por Astrid Lindgren. Klara kaj simpla en la plej pozitiva senco de la vorto. La traduko bone konservas tiujn stiltraĵojn tiel ke la legado glate fluas. Malgraŭ la kompleksa enhavo, la libro estas lingve facila kaj ĝi sendube estas taŭga kiel

lernolibro por preskaŭ ĉiuj niveloj — kiel bonstila legolibro kaj riĉa fonto por vigla diskuto pri la vivo kaj la morto, la bono kaj la malbono.

Temas pri belega libro kun originalaj desegnaĵoj de Ilon Wikland. Astrid Lindgren verkis specialan enkondukon por la esperantoversio. Vere temas pri ege bela sveda kontribuo al nia jubileo. Kerstin Rohdin meritas plenan dankon por la laboro farita.

Haldo Vedin

taŭgajn informojn el ĝi en siajn naciajn lingvojn kaj atentigu pri iliajn lokajn ĵurnalistojn. Ili ja verkos pri Esperanto nur se ili havas informojn!

Radio kaj Televido

Radio-kursoj kaj televidaj kursoj nun okazas en multaj partoj de la mondo. En Ĉinio, oni kalkulas, ke pli ol duonmiliono da homoj lernis Esperanton en formalaj kursoj tra la pasintaj kelkaj jaroj.

Komputiko

Reprezentanto de la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj ĉeestis la Universalan Kongreson, kaj okazigis neformalajn interparolojn kun fakuloj pri komputiko koncerne la utiligon de Esperanto kiel pontolingvo en la maŝintradukado.

Funkciuloj de UEA ĝojegas. "Jaroj da klopodado estas investitaj en la nuna kreskanta populareco de la lingvo", komentis Humphrey Tonkin, prezidanto. "Sendube, estas pli da parolantoj de la lingvo hodiaŭ tra la mondo ol iam ajn antaŭe. La lingvo estas facile lernebla kaj ĝi metas ĉiujn personojn je la sama nivelo en internacia komunikado. Se ni ĉiuj lernus Esperanton dum unu jaro, apud niaj denaskaj lingvoj, la monda lingvo-problemo estus solvita.

Plupo kaj la ursidoj

Recenzo pri la libroj "Plupo kaj la ursidoj" kaj "Plupo en la grandarbaro" de Inga Borg, en traduko de Malte Markheden.

Nun aperis du novaj fabellibroj de Inga Borg en Esperanto, dank al la tradukisto Malte Markheden: "Plupo kaj la ursidoj" kaj "Plupo en la grandarbaro".

La libretoj en multaj landoj povos ĝojigi esperantistajn familiojn kaj infanojn, kiuj nun komencis lerni Esperanton. Tiuj infanoj, kiuj malvolonte sidas kaj lernas, tamen certe tre volonte legos fabellibrojn kaj tielmaniere lernos la vortojn kaj gramatikon. Por ni, kiuj havas denaskajn esperantistetojn, estas tre grave havi ankaŭ esperantlingvajn fabellibrojn, kaj laŭ mi la Plupo-libretoj estas elstare bonaj. Tiujn librojn oni tutsimple ne povas ne ellegi tuj! La bildoj estas ĉarmaj kaj la enhavo instrua, ili helpas

ekkoni kaj kompreni la naturon kun la bestoj kaj instigas gardi ĝin.

La teksto estas sufiĉe facila, kaj tiujn vortojn, kiujn la legantoj ankoraŭ ne konas, ili certe tre volonte serĉos en la vortaro, ĉar la fabeloj estas tre allogaj. Ankaŭ por mi prenreskulo ili estis tre interesaj, kaj mi ĝuis la belajn bildojn kaj tekstojn, kiuj sugestas pacon kaj kompreniĝon inter homoj kaj bestoj.

La fabeloj estas simile konstruitaj, sed la "Plupo en la grandarbaro" enhavas ankaŭ ion kroman. La homoj forhakas parton de arbaro, ĉar ili bezonas la lignaĵon, sed ili devis zorgi pri la renovigo de la arbaro, tial ili plantis arbidajn. Tiel restis la balanco en la naturo kaj la bestoj pardonis.

Ni, kiuj laboras por la interkompreniĝo de la tuta homaro, pensu ankaŭ pri niaj amiketoj la bestoj, kies lingvon ni ne komprenas, kaj pri niaj mutaj amikoj la kreskaĵoj!

Beatrix Svenonius



TIBERIO MORARIU

mortis la 4-an de julio en la aĝo de 86 jaroj. Jam en 1921 la juna Tiberio lernis esperanton en sia hejmurbo Cluj en Rumanio. La instruisto estis la katolika pastro Cseh, kiu per sia instrumetodo edukis multajn instruistojn. Kaj kiel instruisto-prelegisto Tiberio estis invitita al nia lando jam en la jaro 1928. Krom ĉi tie li gvidis sukcesajn kursojn en 20-o da landoj, prelegvojaĝis kaj propagandis nian lingvon kiel dungita sindiko de SEF dum la jaroj 1941-1944. Redaktis La Esperon 1953-1969 kaj dume deĵoris kiel presa sekretario ĉe la Rumana Legacio 1945-50. Post tio li oficis ĉe la sveda eksportfirmao Atlas Copco ĝis sia pensiigo.

Multaj miloj da svedoj partoprenis liajn grandskalajn kursojn antaŭ la dua mondmilito. En la someraj kursoj en Elsinoro li ankaŭ kunlaboris multjare kiel instruisto. Novaj kluboj ekkreskis ĉie kaj la laboro por la progreso de esperanto floris dank' al lia energio kiel neniam antaŭe. Tial en la historio de Esperanto brile reliefigas ne nur lia aktiveco kiel instruisto-prelegisto sed ankaŭ kiel bonega stilisto li elstaras por ĉiam en nia memoro.

La enterigan ceremonion ĉeestis nembroj el la stokholma grupo, kaj multaj aliaj survoje al la kongreso en Pollando memoris lin

per silenta momento en ilia aŭtobuso. Al edzino Sonja kaj filino Dorica ni esprimas nian sinceran kunsenton en ilia funebro.

Sune Ahlm

HELGE NORDQVIST

mortis la 3-an de julio en Hultafors.

Helge estis aktiva membro en Grupo esperantista de Stockholm en la jaroj antaŭ la dua mondmilito kaj deĵoris kelkjure kiel ĝia kasisto. Li estis brila lingvisto kaj diplomita ekonomo kaj dum la lastaj jardekoj antaŭ sia pensiigo internacia revizoro kun la tuta mondo kiel sia laborloko. Ni, liaj malnovaj kunlaborantoj en la ĉefurbo, memoras Helge kiel valoran kaj ŝatatan kunlaboranton kaj samideanon.

Sune Ahlm



La 9-an de septembro la prezidanto de la esperanto-klubo en Trelleborg, Olle Persson, forpasis, 75 jaraĝa. Li jam 1933 eklernis esperanton kaj dum multaj jaroj estis prezidanto kaj senlaca gvidanto de la klubo en Trelleborg. Dum la jaroj 1956-1963 li estis prezidanto de la Skania Distrikto de SEF. Li ankaŭ funkciis kiel UEA-delegito en sia urbo.

Li ripozu en paco!

B.A.

La 21-an de aŭgusto mortis en Budapeŝto la prezidanto de ILEI prof. d-ro István Szerdahelyi post okmonata malsaniĝo.

Prof. Szerdahelyi, unu el la plej konataj kaj plej aktivaj homoj en la nuna Esperanto-movado kaj unu el la plej elstaraj pedagogoj el la tuta historio de Esperanto, lasas grandegan vakuon, kiu ne facile estos plenigebla.

Videblaj de lia ĉeesto inter ni, restos liaj multnombraj libroj kaj

artikoloj, kursoj kaj prelegoj, sed antaŭ ĉio la Esperanto-fako ĉe la Eötvös Lora'nd Universitato en Budapeŝto, kiun li antaŭ 20 jaroj fondis kaj poste majstre gvidis, en kiu formiĝis tiom da elstaraj disĉiploj.

Prof. Szerdahelyi je sia forpaso estis viceprezidanto de HEA, akademiano de Esperanto kaj Honora Membro de UEA.

Bertil Andreasson

SUFICE

Mi rimarkis, ke la vorto "sufice" ofte estas uzata en du tute diferencaj sencoj.

1. Ofte oni uzas ĝin kiel la sveda vorto "tillräckligt" (germane genügend, angle sufficient, enough, france suffisant). Ekz. Mi havas sufiĉe da mono por aĉeti biciklon.

2. Alifoje "sufice" anstataŭas la svedajn vortojn "ganska" aŭ "tämlichen" (germ. ziemlich, ang. fairly, fr. assez). Ekz. Hodiaŭ estas sufiĉe bela vetero (t.e. malpli bela ol bela).

Tia duobla senco de vorto estas malbona kaj povas okazigi miskomprenojn.

En n-ro 3/87 paĝ. 45 de "La Espero" mi legas:

"Sufice malmultaj lernas esperanton pro tio ke sufiĉe malmultaj lernis esperanton". Se oni ĉi tie konceptas "sufice" kiel "tillräckligt" la frazo ŝajnas tre stranga.

Mi opinias, ke estus plej bone se oni uzus la vorton "sufice" nur en la senco 1 (supre). Kaj en la senco 2 oni uzu la vorton "relative". Eĉ novan vorton oni povus akcepti tiukaze. Mi proponas (kaj proponis) la neologismon "zimle".

Cu mi sufiĉe klarigis la aferon?

M. Markheden

Posttidning

Avs. Svenska Esperantoförbundet
Brunnsgatan 21
111 38 Stockholm

HAR DU ÄNDRAT ADRESS?

Fyll i rätt adress och skicka in *hela* remsan
(även den gamla adressen) till SEF.

Invito al Ingemund Bengtsson de BEA

Ĝiam mi estis en Sofio mi renkontis reprezentanton de Bulgara Esperanto-Asocio, Petăr Todorov. Li informis, ke li sendis al nia SEF-prezidanto, Karin Lindquist, leteron petante ŝin transdoni oficialan inviton al la prezidanto de la sveda parlamento, Ingemund Bengtsson de BEA, ke dum venonta oficiala vizito en Bulgario aranĝi renkontiĝon kun reprezentantoj de BEA.

La kaŭzo por la invito estis jena. En decembro 1986 oficiala bulgara parlamenta delegacio, kun gvidanto s-ro Stanko Todorov, prez. de la bulgara parlamento, vizitis Stokholmon, oficiale akceptita de Ingemund Bengtsson. Dum unu el la renkontiĝoj inter la delegacioj Ingemund Bengtsson starigis demandon pri la bulgara

esperantomovado kaj i.a. petis ilin havigi al li la gazeton, "Bulgara Esperantisto". Hejmenveninte oni per Bulgara Ministerio pri Eksteraj Aferoj aranĝis tion.

Poste la estraro de BEA diskutis la aferon kaj venis al la konkludo ke verŝajne estos baldaŭ vizito de sveda parlamenta delegacio en Bulgario, gvidata de s-ro Bengtsson. Tion supozante BEA-estraro sendis oficialan leteron al sia prez. de la bulgara parlamento, petante ke oni enprogramigu oficialan renkontiĝon inter s-ro Bengtsson kaj BEA, ĉu en Sofio, ĉu en Esperanto-Kursejo en Pisanica dum vizito de sveda parlamenta delegacio.

S-ro Petar Todorov ankaŭ petis min persone transdoni al Ingemund Bengtsson ilian dankon

por lia iniciato demandi pri la esperantomovado bulgara. Tio donis ankaŭ al ilia laboro pli da oficialigo kaj altigas la lingvan prestiĝon de esperanto.

Komprenoble ni en la estraro de Sveda-Federacio ĝojas pro la iniciato de niaj bulgaraj kolegoj kaj transdonis al s-ro Ingemund Bengtsson ilian inviton kaj proponon kaj sendos oficialan leteron al nia prez. de la sveda parlamento ke en venonta oficiala vizito de parlamentanoj en Bulgario estos en la programo renkontiĝo kun reprezentantoj de BEA. Ili povos informi pri la evoluo de libroeldonado kaj instruado en esperanto, pri E-aktivo kaj turismo k.t.p.

Pli da tiaj iniciatoj kaj nia laboro eble estu pli facila.

Märtha Andreasson

Novaj vortoj

Ĉiutage ni renkontas vortojn kaj esprimojn, kiuj ne estas troveblaj en Svensk-Esperantisk vortlibro. Jen kelkaj novaj, uzeblaj vortoj:

| | |
|------------------------|-------------------------------|
| Kärnreaktor | = nuklea reaktoro |
| Kärnkraftverk | = nuklea centralo |
| Kärnenergi | = nuklea energio, atomenergio |
| Härdsälta | = interna fandiĝo |
| Radioaktivt nedfall | = radioaktivaj defalaĵoj |
| Radioaktivt sönderfall | = radioaktiva disfalado |
| Terawatt | = teravatto |
| Värmepump | = varmopumpilo |
| Oljetanker | = petrolŝipo (cisternŝipo) |
| Värmeåtervinning | = reuzado de varmo |
| Sopförbränning | = rubbruligado |
| Raketuppskjutning | = lanĉado de raketo |
| Cesium 137 | = cezio 137 |
| Laser | = lasero |
| Exponeringsmätare | = eksponmetro |
| Immunbristsjukdom | = imundeficita malsano |
| Komputer | = komputoro, -ilo |
| Blixtaggregat | = fulmlumilo |
| Synthesizer | = (muzika) sintezilo |

"Square Docteur Zamenhof"

Square Docteur Zamenhof estis oficiale inaŭgurita la 10-an de majo en Chambéry, Francio.

Sinjoroj C. Turzanski, ĝenerala konsulo de Pollando kaj A. Gervason, vicurbestro de Cahmbéry, ambaŭ malkovris la stratpanelon. Dum la ceremonio, la esperanto grupo transdonis al la vicurbestro la amason da 438 gratuletoj destinitaj al la urbkonsilio, kiu unuanime decidis tiele honori Zamenhof. Tiuj gratuletoj venis el 44 landoj kaj 8 esperantistoj de Svedio sendis leterojn, ĉu propranome, ĉu nome de ilia esperanto grupo.